# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-19 sendita el Budapeŝto la 18an de majo.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 73 – alirinformoj kaj precizaj horoj

La plena programo aperis en EKO 18. Nun ni povas anonci la precizajn horojn:

UTC (la Greniĉa horo): 12:00 ĝis 15:00

CEST (Centreŭropa tempo): 14:00 ĝis 17:00.

Irana tempo: 16:30 ĝis19:30

Japana tempo: 21:00 ĝis 00:00

Kalifornia tempo (PST): 05:00 ĝis 08:00

Memoru, ke okazos en dimanĉo, la 30an de majo. La uzota komunikilo estas *Zoom*, jen la aliraj informoj, kiujn vi ne plusendu al ne-esperantistoj.

https://zoom.us/j/4450123381?pwd=ZmU4bjJuS3RtRmE3YUtlQXRhSWlQdz09

Zoom ID: 445 012 3381

Pasvorto: IKEF2021.

La enkonduko por la seminario estas preta kaj estas alkroĉita. Eksciu pri la agado de IKEF; se tio interesas vin, kontaktu ilin!

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

Redaktoroj: Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



**ENHAVO**


- AMO 73 - aliro
- Trimonataj raportoj
- Manlibra riĉigo
- Duolingo utilas
- Greziljono proponas
- Jokohama muzeo

# UEA kaj ILEI eldonis trimonatajn raportojn

La Asocio **UEA** disponigas al vi la trimonatan progresraporton de la Estraro de UEA dum la periodo Januaro-Marto 2021. La 3-paĝa dokumento, densa kaj konciza, estas organizita laŭ la tradiciaj kategorioj: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kapabligo. Ene de Konsciigo estas raportado pri la agado en eksteraj rilatoj, precipe ĉe UN. Fine aperas statusraporto pri la projekto AKSO (pretigantoj de la nova retejo de UEA), kunverkita de la AKSO-teamo kaj de la Estraro.

Ĝi estas havebla en la komitata Teko: uea.org/teko/komitato

Jen rekta kaj bele mallonga ligilo: mallonge.net/marto

La Ligo **ILEI** pretigis same tripaĝan raporton por la sama trimonata periodo. En la raporto aperas la plejlastaj informoj pri la Kongreso de ILEI en Kotonuo, Benino. Tio okazos inter la 7a kaj 14a de aŭgusto, kaj enhavos Universitatan Simpozion [Ĝi plie enhavos la AMO-seminarion 76, pri kiu sekvos baldaŭ pli konkretaj informoj – SMG]. Plie estas informo, ke 2021 estas por ILEI la elektojaro, kaj 3 el 7 el la nunaj estraranoj ne rekandidatiĝas. [La elekto-komisiono laboras! – SMG]. ILEI aktivas per Fejsbuko kaj Jutubo. La Ligo rilatis kun Unesko okaze de la Internacia Tago de Edukado. ILEI starigis ĉiumonatan forumon por siaj landaj agantoj kaj aktive prezentis sin en AMO 72, kaj patronos la 9-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj, en Vroclavo, Pollando septembre. Jen la raporto:

https://www.ilei.info/agado/2021-04-15_Raporto_pri_trimonata_periodo.pdf

En la sama retejo, vi trovos la plej freŝajn informojn pri la Kongreso de ILEI:

https://www.ilei.info/novajxoj/kongreso2021.php

# Manlibro havas retan daŭrigon

En decembro 2020 aperis la 4a eldono de la Manlibro pri instruado de Esperanto. Ĝi estas reredaktita, ampleksigita kaj enhavas multajn novajn informojn pri la evoluo de lingvolernigaj novaĵoj de la lasta jardeko. Nun ni lanĉis novan sekcion en edukado.net, dediĉitan nur por la Manlibro kaj koncernaj informoj, aldonaĵoj.

En tiu paĝo vi povas legi ankaŭ pri la rilata, nun organizata somera evento. Por ke la aĉetintoj pli bone komprenu la libron, havu helpon trastudi ĝin, kompreni kaj bone utiligi ĝin, **ni okazigos virtualan prelegserion kaj seminarion** baze de la libro. L**a programo komenciĝos la 5an de junio** kaj laŭplane okazas en sinsekvaj semajnoj dum la somero. Bonvolu viziti la paĝon https://edukado.net/manlibro , legi pri la **Prelegoj kaj seminario**, kaj se vi interesiĝas, bv. anonci vin.




Katalin Kovats

# *Duolingo* – daŭre valora ilo




Ĝi estas nur unu el pluraj kursoj, kiuj estas eminente reklameblaj kaj uzeblaj en nia strebo altiri pli da pli junaj membroj al nia Eŭropa movado – la temo de AMO 74 en la Virtuala Kongreso de UEA. Vidu ĉe:

https://www.duolingo.com/courses

La **angla-esperanta** lingvokurson altiris 293.000 vizitojn, la **hispana-esperanta** 242.000, la **portugala-esperanta** (en beta-versio) 218.000, la **franca-esperanta**(en beta-versio) 59.700 vizitojn. Jam pretiĝas ankaŭ la **ĉina-esperanta** versio.

Informis: Ludoviko Molnar, Hungario

SMG aldonas: Krom la angla la ciferoj povas esti iom eksdataj, sed la esenco restas, ke Duolingvo fariĝas ĉiam pli vaste utila.

# Greziljono buntas tra ĝia somero kaj pli

Jen la aktuala programo laŭ nia reta agendo: **https://gresillon.org/agendo**

Por ajna demando skribu al: gresillon@gmail.com aŭ kastelo@gresillon.org



2021-majo-25/29: Ĥora (korusa) renkonto de Interkant kun Zdravka Bojĉeva

2021-julio-05/09: Verda Naturisma Semajno kun INOE, FestiNATUR

2021-**julio**-23/aŭg-01: **Maratona Esperanto-kurso** kun Koutny Ilona kaj aliaj
2021-julio-25/31: Internacia E-Konferenco post OSIEK pri variaj temoj + AMO-seminario 75

2021-**aŭgusto**-02/12: Festa Semajno por **infanoj kaj familioj** kun Nicky, Jean-Luc, Larisa

2021-aŭgusto-13/20: FESTO' revenas, mojosa junulara renkontiĝo

2021-aŭgusto-27/29: Someraj Universitatoj de pluraj organizoj

2021-**oktobro**-20/24: Ĥora (korusa) renkonto de Interkant kun Zdravka Bojĉeva

2021 oktobro-20/24: **Migrada semajno** (nur en Esperanto) kun Olivier Buisson

2021-okt-24/nov-01: AŬTUNE, la Esperanto-ferioj - kun halovena festo

La foto: Grupo vizitis la kulturcentron en 2015, post la UK en Lillo.

# Jokohama muzeo – salutinda projekto

Je 2021-04-23, nia grupo Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama en Japanio havis la 6an fondotagon, kaj memore al tio, ni inauguris Esperato-Muzeon Jokohaman, en loghkvartalo de urbo Jokohama (la urbo de la 92a UK en 2007).

En 2021-04-25, ni havis Malferman Tagon nur al esperantistoj, kaj ni esperas havi inauguron al la civitanoj, al kiuj ni ja celis la muzeon --- sed pro la KOVIMa pandemio, tio okazos espereble post kelkaj monatoj.



En la foto kun ekstera aspekto, oni vidas ŝtofan flagon --- kion ni planas anstataŭigi per plasta montropanelo. Nealdonita foto montras ekspozicion en la unua etaĝo, nome Ĉambro Zamenhof. Nun oni ekspozicias unuajn lernolibrojn de diversaj nacioj, kolektitaj pere de esperantista reto.
En la dua etaĝo estas la Ĉambro Hodler, plene de libroj esperantaj.

La muzeo plenumiĝis dank' al bonkora ofermono de anonima subtenanto, kaj kolektiĝis pli ol 7 mil libroj el esperantistoj el Japanio. Daŭras katalogigo de la libroj.

Sibayama Zyun'iti, el Jokohamo (Yokohama), Japanio

# Poemaro: 'Viv-teatro'

Mikaelo Bronŝtejn prezentas sian la plej freŝan poemaron "Viv-teatro". Ni invitas spekti la filmeton, "ŝati", aboni nian jutuban kanalon kaj disvastigi la ligilon:

https://www.youtube.com/watch?v=QgwNKF8n5dI

========= vortoj: 840 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.